

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo vendredon la 27an de aprilo 2012, per Skype.

(Interkonsiliĝo prokrastita de la 12a de aprilo 2012. Protokolo aprobita la 28an de junio 2012.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Eli Eriksen Fitjar en Töreboda
Ulf Chr. Lunde en Os en Hordaland
Mario Machlik en Tromsø
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 8an de marto 2012

La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio.
Skagen vekst: 33 404 kr
Skagen høyrente: 61 091 kr

3. Jarkalkulo 2011

La jarkalkulo preskaŭ pretas.

4. Jarraporto 2011

La estraro laboras pri la jarraporto.

5. Datoj por la Landa Kongreso 2013

La Oslo-klubo petis la estraron de NEL elekti inter du semajnfino. La estraro elektas 14.–16. junio 2013.

6. Salutanto por la UK en Hanojo

Ni ne havas personon kiu pretas aranĝi NEL-budon en la Movada Foiro dum la UK (vd. protokolon 9an de februaro 2012), sed Herman Ranes pretas saluti la kongreson nome de NEL.

7. Sveda projekto «esperanto-info»

La estraro de NEL ricevis demandon pri eventuala norvega partopreno en (aŭ kontribuo al) la sveda interreta projekto «esperanto-info». La estraro traktis la demandon, kaj konkludas ke kvankam la projekto estus interesa, ni ne scias kiom kostus, kaj nia ligo ne estas en bona ekonomia stato.

8. La jubilea jaro 2012

Mario Machlik informis: Stariĝis la norveglingva jubilea retpaĝo esperanto125.com. La laboro komenciĝis ĉe la junuloj en Oslo. La retpaĝo reklamis por la 125-parta kurso de ILEI, sed la kurso malfruis kaj ne realiĝis. Hilde Dahlberg anstataŭe faris kurson per Twitter, kaj ĝi aperas ankaŭ en la jubilea retpaĝo. 59 personoj sekvas la kurson per Twitter, inter ili kompreneble ankaŭ pluraj esperantistoj. La grupo produktis kelkajn informilojn surpapere, kaj aldone Douglas Draper (diskutante kun Jardar E. Abrahamsen) faris gazetaran tekston. La jubilea grupo konsistas el Hilde Dahlberg, Douglas Draper, Kristoffer Haug, Leif Arne Storset, Judith Parelie Abrahamsen (helpanto pri teknikaj aferoj) kaj Mario Machlik.

9. Eventualajoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30–21:52.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 24an de majo 2012.

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.